

Flandra ESPERANTISTO

TIJDSCHRIFT VOOR ESPERANTO - ONDERWIJS EN - PROPAGANDA

Verschijnt maandelijks
Achtste jaargang
Nummer 11 (209)
NOVEMBER 1951

Vertegenwoordiger in Nederland:
LEEN
sekr. Stadionkade 6, Amsterdam Z.
postrek. 34563 van P. M. Mabesoone
Pythagorasstr. 122, Amsterdam O.

Orgaan van de
VLAAMSE ESPERANTISTENBOND
POSTBUS 342, BRUSSEL
Postrekening 2321.50 van V. E. B.
Van Heurckstraat 7, Antwerpen

LIDGELDEN:
* Leden: 75 fr.
* Steunleden: min. 150 fr.
Inwonende leden: 25 fr.
(* met bondsorgaan)

ABONNEMENTEN:
België: 60 fr.
Ceteraj landoj: 75 bfr.
Proefn.: 5 fr. (1 r.k.)

LA GAZETARO

Por venki, nia movado bezonas helpantojn kaj prefere tiujn kiuj estas sufiĉe potencaj. Neniu kontraŭdiros ke en la lasta jarcento la gazetaro fariĝis potenco, kiun timas eĉ la granduloj de la mondo. Statestroj, politikistoj, artistoj kaj komercistoj bezonas la laŭdon kaj subtenon de la ĵurnalistoj. Diktatoroj tial buŝligas aŭ malpermesas gazetojn, kiuj ne estas plaĉaj al ili.

Tio jam provas ke la gazetaro estas influebla. Ĝi eĉ luigas parton de sia potenco kontraŭ pago kaj ĉiu granda komerca entrepreno profitas tiun okazon elspezante grandajn sumojn por reklamaj anoncoj.

Ankaŭ la Esperantistoj de tempo al tempo uzas tiun reklaman valoron, anoncante ekz. kursojn, publikajn kunvenojn k.t.p. Sed tiu vojo estas tiel multekosta ke la monrimedoj de niaj organizaĵoj nur permesas maloftan uzon. Des pli grave estas eluzi la potencon de la gazetaro en alia maniero, nome peti, ke oni verku aŭ almenaŭ enpresigu favorajn por ni artikolojn. Tio estas atingebla se ni nur konsciiĝu pri la celo kaj tasko de gazeto. La ĵurnalisto devas presigi novaĵojn kaj cetere legaĵojn, kiujn la publiko ŝatas. En la komenca epoko de Esperanto tial ne estis malfacile atingi la kolonojn de la gazetararo: Ĉio pri ĝi ja estis novaĵo, eĉ iom sensacia, kaj kvankam la atento de la ĵurnaloj ofte estis moka, malaproba, iam eĉ ofenda, la atento ne mankis.

Sed nuntempe Esperanto mem estas sufiĉe konata kaj kvankam ĝi gajnis pli da respekto, ni ne estu tiel naivaj kredi ke la gazetaro presigos artikolojn, kiuj estas rekte reklamaj. Ni ne sufiĉe frue rekonis tiun fakton. Tial la pli granda parto de artikoloj ensenditaj de nia flanko ne estis presata kaj pro tio la verkintoj kaj perintoj perdis la kuraĝon kaj preskaŭ ĉie regula prilaboro de la gazetaro ĉesis.

Nun venas la momento reorganizi gazetarservojn laŭ la nova vidpunkto. Konsilinde estas ke ni elektu por ĉiu lando unu centran gvidanton, kiu kolektas informojn, kiujn li verŝas en la veston de novaĵo (ofte tre simpla ago) kaj dissendas por publikigo en la „granda gazetaro“ kaj en la lokaj ĵurnaloj. Prefere li uzu por tio la helpon de oficiala gazetara oficejo, kiu estas liveranto de novaĵoj al multoj ĵurnaloj.

Lokaj helpantoj kontrolu ĉu tiuj novaĵoj vere aperas en la al ili konfidentaj gazetoj. Se la vojo per la gazetara oficejo ne trafis celon, ili rekte sendu al la ĵurnaloj.

La lokaj helpantoj kompreneble ankaŭ okupu sin pri la tasko engazetigi la aferojn, kiuj nur aŭ speciale rilatas al la loka laboro.

Krom centran gvidanton kaj lokajn helpantojn ni bezonas ankoraŭ helpantojn, kiuj prilaboras la multajn periodaĵojn, kiuj agas ne sur la kampo de la novaĵoj,

UNIVERSALA KONGRESO DE ESPERANTO

MÜNCHEN

4-11 AŬG. 1951

La laboroj de la kongreso estis plenumataj en 4 sekcioj, kies prezidantoj raportis vendredon la 10-an de aŭg. en la ĝenerala kunveno:

La Unua Sekcio

Preskaŭ 350 kongresanoj partoprenis sub prezidanteco de d-ro Kennedy la kunsidojn de la Unua Sekcio, kiam oni pritraktis la temon „Esperanto en la edukado de la plenkreskuloj“. Laŭvice oni diskutis pri la kvin subsekcioj de la temo nome: kiel allogi ilin, kiel instrui ilin, kiel reteni ilin, kiel enkonduki ilin al Esperanta literaturo kaj kiel aktivigi ilin. Estis konsentite, ke por la sukceso de kurso necesas precipe ne Esperantisto, kiu flue parolas la lingvon, sed homo, kiu bono scipovas instrui ĝin. Evidente en kelkaj landoj mankas malgrandaj kaj malkaraj Esperantovortaroj kaj pri tiu punkto la anoj de la Unua Sekcio atentigas la koncernajn landajn asociojn.

La Dua Sekcio

La kunsidojn de la Dua Sekcio ĉeestis 98 scienculoj kaj teknikistoj el diversaj landoj. Prezidis prof. I. Lapenna. La ĉefaj rekomendoj rilatas al starigo de sliparo pri la plej valoraj sciencaj verkoj tradukindaj aŭ resumindaj en Esperanto; al provo funkciigi nian Someran Universitaton en du partoj, tiel ke la unua okazu ekster la kongreso en grava universitata centro kaj la dua kiel ĝis nun en la kadro de la Universala Kongreso; al fondo de novaj studentaj kaj intelektulaj grupoj kun la celo havigi al Internacia Scienca Asocio Esperantista pli larĝan bazon kaj al la scienca literaturo pli grandan legataron. La Dua Sekcio akceptis alvokon al la sciencistoj de la mondo. Kiel aparta komisiono de la Dua Sekcio kunsidis la Sociologia Komisiono.

La Tria Sekcio

Antaŭ ĉio la Tria Sekcio sub prezidanteco de prof. L. Laurat pridiskutis la eblojn pri starigo de listo de beletristikaj verkoj tradukindaj en Esperanton. La Tria Sekcio akceptis rezolucion en kiu ĝi rekomendas ke oni publikigu listojn de ekzistantaj, jam tradukitaj verkoj. La Sekcio plu rekomendis, ke U.E.A. starigu konstantan komisionon, konsistantan el almenaŭ po unu fakulo el ĉiuj landoj, kies tasko estu elekti la tradukotajn verkojn, precipe tiujn, kiuj povus plialtigi la kulturalan nivelon de nia movado. Fine la Sekcio sugestis, ke en ĉiu lando la membroj de la komisiono elektu eltirajojn el sia landa verkaro por eventuala eldono de internacia antologio. Apartan atenton la Sekcio dediĉis al la starigo kaj funkciigo de teatra trupo. Fine la Sekcio rekomendis interŝanĝon de mallongaj 16 mm kulturfilmoj.

La Kvara Sekcio

La temo de la Kvara Sekcio estis Esperanto en la internacia trafiko kaj komerco. Prezidis s-ro P. Petit. La Sekcio akceptis diversajn rekomendojn al la kongreso. Rilate al internacia trafiko ĝi konsideris necesa plimultigon de la nombro da Esperantistaj turistoj, ĉar nur se tio okazos, oni povas atendi, ke la hoteloj pli vaste uzos Esperanton. Ĝi rekomendis, ke hoteloj, kiuj uzas Esperanton, havu specialan insignon por tion indiki. Ĝi pritraktis ankaŭ paŝojn necesajn por pliampleksigi la uzon de Esperanto ĉe la polico, doganoj kaj fervojoj. La Sekcio konsideris, ke estus bone, se en la programo de la Universala Kongreso estus specialaj prelegoj pri la historio, folkloro, artaĵoj kaj fabrikoj de la urbo kaj lando en kiu ĝi okazas.

ANTVERPENO, URBO DE NIA KONGRESO

LA DOMO KAJ LABOREJO DE RUBENS

Ekde 1946 neniu fremdulo, vizitanta Antverpenon, preterlasas samtempe viziti la domon kaj la laborejon de Rubens en la nun samnoma strato en la urba centro.

Plej signifa por la energio kaj optimismo de la Antverpenanoj estas, ke oni dum la milito kaj eĉ dum la eksplodo de la V-bomboj en la urbo, seninterrompe daŭrigis, sub la gvidado de la urba arĥitekto Em. Van Averbek, la rekonstruon kaj renovigon de la princa loĝejo, starigita de la plej fama flandra pentristo el la 17-a jc., kiu es-

kiel revuoj, fakaj, asocioj aŭ lernejoj organoj, k.t.p. Preskaŭ ĉiu Esperantisto povas helpi en tiu rilato. Se li mem ne estas kapabla verki artikolon por iu speciala rondo, li petu helpon de la gvidanto, kiu siaflanke povu disponi pri kelkaj kapablaj helpantoj.

Granda rolo povos havi la nekta reklamo. Ekzemple tradukoj de artikoloj pri interesaj (neesperantaj) aferoj el Esperantogazetoj aŭ reverkaĵoj kun indiko de la fonto estas tre uzeblaj. Ĉi tie estus loko por interŝanĝo inter naciaj gazetarservoj kaj por interrilatoj kun la internacia gazetarservo (sekr. s-ro E. Adamson, Värmlandsgatan 18, Göteborg, Sved.).

La celo de ĉi tiu artikolo ne estas liveri kontribuon de valoro nur akademia, sed stimuli ĉiujn pripensi la eblojn indikitajn. La rezulto devas esti ke multaj anoncos sin por kunlaboro en renovigita gazetarservo.

H. J. B.

tas unu el la plej belaj privataj domoj en la lando.

En 1610 Rubens aĉetis de komercisto, loĝanta en Amsterdamo, terenon kun linblankigejo kaj domon el 1520 kun dependaĵoj. Li kunigis kaj ampleksigis la tuton kaj krome starigis vastan, altan konstruaĵon laŭ itala stilo, kiun li destinis por laborejo kaj ekspoziciejo. Ekstere ĝi estis ornamita per kolonoj, brustbildo kaj freskoj, kio tiutempe estis novaĵo.

La plej eminentaj personoj el lia tempo, inter kiuj gearĥidukoj Alberto kaj Izabela tie vizitis la majstron, kie li kreis la plej multajn majstroverkojn en kunlaboro kun pentristoj kiel Van Dyck, Seghers, Schut, Van Thulden k.a.

Post la morto de Rubens en 1640, lia edzino Hélène Fourment plulogis en la domo kun siaj infanoj ĝis proks. 1645.

La urbo sensukcese provis akiri la faman domon en 1672, 1880, 1887 kaj en la komenco de la nuna jarcento, poste en 1913 kaj 1919. Estis nur en 1937, ke la urbestro atingis finan rezultaton. Ekde 1939 oni komencis la rekonstruon de la intertempe grave aliĝita loĝejo, por kiu oni uzis preskaŭ ekskluzive malnovajn brikojn, trabojn kaj ĉevronojn el la origina domo. La plej malnovaj brikoj estis uzataj por la riparado de la ekstera fasado de la familia ĉambro kaj por la rekonstruo de la duonronda muzea ĉambro. Por la stratfasado oni uzis brikojn laŭ la malnova flandra formato, kaj denove utiligitaj krome estis blankaj ŝtonoj kaj ardona gnejso. Preskaŭ ĉiuj fenestraj kadroj estas tiel faritaj. Grupo de 23 skulptistoj prilaboris la materialon laŭ la procedo en la 17a jc. Nuntempe oni daŭre pliriĝigas la domegon, ekz. jam per kelkaj pecoj apartenintaj al Rubens kaj oni reordigis la tipan ĝardenon malantaŭ la domo, konatan el liaj pentraĵoj, en kiu troviĝas nur kreskaĵoj florantaj en lia tempo.

La intenco de la antverpena urbestro estas, ke oni sentu la atmosferon

Wereldnieuws

De heer S. Pragano geeft dit jaar twee cursussen Esperanto aan de Universiteit te Amsterdam, nl. een vervolgcursus, bestaande uit lectuur en spreekoefeningen en een cursus voor beginners. De colleges zijn begonnen op Woensdag 17 October.

„De Typhoon“, dagblad voor de Zaanstreek, publiceert opnieuw een schr. cursus Esperanto voor beginners. Ook de Winschoter Courant geeft een schr. cursus.

De V.A.R.A. is begonnen met de aankondiging in het Esperanto van de muzikale gramfoonplaten-programma's, die worden uitgezonden elke Vrijdag 23.30-24.00 uur en om de andere Maandag 23.10-23.40 uur.

Op 3 Juni werd in het Esperantomuseum in Wenen het Pantheon van de Esperanto-beweging geopend, waarin alle portretten van de pioniers van onze beweging bijeengebracht zullen worden. Bij de plechtige opening werd o.a. het woord gevoerd door W. Miklas, oud-president van Oostenrijk.

Ter gelegenheid van het „Festival of Britain“ heeft de Londense Coöperatieve Veren., die meer dan 1000.000 leden telt een affiche in het Esperanto verspreid, ter verwelkoming van de buitenlandse gasten.

Het philatelistisch jaarboek 1951 van de „Revista Filatelica Paraguaya“ te Paraguay bevat teksten in het Spaans, Engels, Frans, Italiaans, Duits en Esperanto.

Het ministerie van onderwijs in Noorwegen subsidiëert Esperanto-cursussen aan avondscolen.

Bij de uitgeverij St. Gregoriushuis te Utrecht is een serie wandplaten verschenen, ten gebruike bij het onderwijs in de Bijbelse Geschiedenis met onderschriften in 10 talen o.a. Esperanto.

Het internationaal congres van „World Student Federalists“, dat in Augustus te Kopenhagen is gehouden, heeft een resolutie aangenomen waarin alle internationale organisaties die voor de vrede strijden wordt aanbevolen, gebruik te maken van Esperanto.

en tiu domo, atestanta pri la luksa gusto de Rubens, atmosferon kiu memorigas pri lia restado, kaj kiun multaj el miaj legantoj versajne jam enspiris el literaturaj, kiel ekz. la ankaŭ en nederlandan lingvon tradukita verko pri la vivo de Rubens, de la hungara verkisto Zsolt Harsányi, „ElNi Jo“ (Dit was leven).

H. Vermuyten.

KURAĜIGO

Somermezo, sur kamparo
Suno brule brilas nun.
Polva vojo kaj ne ombro
Por sin ŝirmi kontraŭ sun'.
Dika viro, kapo ruĝa
Blouspirante iras tie;
Por informi pri la vojo
Homon vidas li nenie...
Jen... ĵinfine kampararon
Laborantan vidas li.
Alveninte li demandas:
„Diru kamarad' al mi,
Ĉu vi povos min permesi
Rekte iri tra l' kampar',
Por atingi la stacion
Frue pro la vagonar'?
Ĉar mi volas trafi trajnon
Je duono post la ses'.
Ĉu vi kredas: tio eblas? "
Kamparan' respondas: „Jes,
Se vi iras al stacio
Rekte tra l' kamparo mia,
Tiu vojo certe estas
Pli mallonga ol alia.
Sed sur kamp' estas virbovo;
Kiam ĝi ekvidos vin,
Vi eĉ povos trafi trajnon
Je duono post la kvin! "
N. Vorst.

OBSERVOJ

EMINENTA MALLERTAJO



En München okaze de la ferma solenajo de nia universala kongreso, la anstataŭanto de la pro malsano malhelpata prezidanto de U.E.A. kredis oportuna aludi pri Dachau kaj la tie okazintaj fiagoj.

Vole nevole la ĉeestantaj samideanoj vidis en tiuj malfeliĉaj vortoj apenaŭ vualitan riproĉon al la germanaj samideanoj-gastigantoj.

Se ni foje kongresus en Usono, ĉu tiam troviĝus iu oficialulo sufiĉe eminenta mallerta por aludi pri Hiroŝima? Ni esperas ke ne, ĉar de esperantista eminentulo oni rajte atendas sufiĉe da takto por ne paroli pri la ŝnuro en la domo de l' pendigito.

Pik.

LA SINMORTIGANTO (DE ZELFMOORDENAAR)

Piet Paaltjens

En la densa arbar' / En la fin' de la jar' / Promenis sinjoro nur sola, / Kun obtuza okulo / Sajnis li frenezul' / Kaj dentknaris sur io malmola.

Ekkrio subita / El gorg' kunpremita! / „Mi jetas for la cerbumon!“ / Li batis sur jakon / Piedpaŝis en flakon: / La ŝlim' kovris baldan kolumon!

Jen staris kverk' dika / Kun branĉo fortika, / Solida por porti la korpon. / Snuregon li tiris, / Nenion li diris, / Kaj ŝnuro lin pelis en morton.

Silento fariĝis, / La grund' glaciĝis / Dum vintra malvarma vetero; / Kaj tie do pendis / Li, kiu ne plendis, / Kaj miris fluganta pasero.

Sed vintro forpasis, / Printempo jam lasis / Terenon al milda somero: / La solaj trantoj / Estis par' da amantoj / En arbar' dum belega vetero.

Ripozon trovinte / Ili sin kisinte / Rigardis pasimaniere: / En sama momento / Rompiĝis silento / Ĉar boto falis altere,

De sinjoro mortinta, / De kadavro putrinta / Falis boto kun bat' al la tero; / La du geamantoj / Buŝ' sur buŝon premantaj / Rigidigis kiel stangoj el fero.

Sur la kap' de l' ostar' / En la densa arbar' / Restadis ĉapelo sen rando. / El truoj de l' vestoj / Spionis la bestoj: / Formikoj kaj vermoj en bando.

Horloĝ' difektita! / Nazumo rompita! / Malmulta tolaĵo nur restis! / Manĝanta limako / Sur bord' de la jako! / Grasega limako ĝi estis!

Ĉesis karesado, / Finiĝis brulado / Ĉe l' par' en arbara densejo; / Paliĝis vizaĝoj / Kiel blankaj tolaĵoj / Post unu semajn' sur herbejo. / trad. M.E. Navijn.

PROMOTIE W. P. ROELOFS

Woensdag 17 Oct. promoveerde tot doctor in de technische wetenschap aan de Technische Hogeschool te Delft de heer dr W. P. Roelofs (lid van L.E.E.N.) op een proefschrift „Critical and econometrical study in „Social Credit“. De heer Roelofs, die een resumé in Esperanto aan zijn proefschrift toe heeft gevoegd betreunde het, dat hij het gehele proefschrift niet in het Esperanto kon publiceren. Van zijn stellingen vermelden wij de volgende: „Het is te betreuren, dat dit proefschrift in het Engels, te veroordelen dat het uitsluitend in het Engels is gesteld“. In 1952 zal zijn proefschrift in het Engels en Esperanto verschijnen.

LA STUDANTO

Uitwerkingen van de opgaven in het vorige nummer:

Vian tre interesan leteron, en kiu vi rakontis tiom pri via lando, mi hieraŭ ricevis. Mi tute dankas pro la belaj bildoj montrantaj viajn popolon kaj pejzaĝojn. Jam tiuj bildoj montras, ke en via lando la klimato estas multe pli varma kaj agrabla ol ĉe ni. Estas tre afable, ke vi invitis min veni al vi en la venonta libertempo. Ho, se mi nur estus riĉa, kiom volonte mi vojaĝus tien! Sed bedaŭrinde mi ne estas riĉa kaj ne povas trovi la monon por la vojaĝo, kiu ja estas tre multekosta. Jam tri monatojn mi estas senlabora (sen laboro) kaj estas tre malfacile trovi novan oficon. Post multaj jaroj mi eble havos sufiĉe da mono por rigardi la sunon, brilantan en via hejmlando.

1. Kiam la suno brilas, ĉio ŝajnas (esti) pli bela. 2. La lernejestro envenis kun ruĝega kapo. 3. Kara infano, ĉi tiuj estas la plej bonaj libroj, kiujn mi posedas. 4. Ĉu ekzistas vortoj, konsistantaj el pli ol kvin silaboj? 5. Dum mia tuta vivo mi ankoraŭ ne aŭdis tiom da bruo. 6. Li forvojaĝos morgaŭ frumatene. 7. Ĉu vi preferas rajdi sur ĉevalo ol veturi aŭtomobile? 8. Ĉu vi ne konas ŝian edzon, tiun longan viron kun nigra barbeto? La maljunulo bruligis ĉiujn malnovajn dokumentojn. 10. Li gajnas pli ol li meritas laŭ sia kapablo.

6. Ĉu via frato ne ankoraŭ estas hejme? 7. Kiam vi volas subteni nian movadon, aliĝu al nia asocio!

Vul in ig of ig:

Mia hundo, kiu nom—is Fidelo, nask—is kaj grand—is en nia domo kaj far—is mia plej fidela amiko. Vi do komprenas, kiom mi malfeliĉ—is, kiam ĝi iun tagon malsan—is kaj mi ne plu povis trinki—i, nek manĝ—i ĝin. Mi ven—is kuraciston kaj petis lin resani—i mian malsan—intan hundon. Sed la kuracisto, vidinte ĝin, diris: „la besto jam tro maljun—is, ĝi ne plu povos resani—i kaj mi do devas morti—i ĝin.“ Kiam mi aŭdis tion, mia koro preskaŭ romp—is, ĉar mi ne povis sen—i min de mia fidela amiko, sed mi ankaŭ ne povis sufer—i ĝin pli longe. Mi ne rigardis, kiam la kuracisto prenis ĝin kaj malproksim—is sin kun ĝi; mi aŭdis, ke pordo ferm—as kaj mi sciis, ke Fidelo kaj mi dis—is por ĉiam. Ho, Fidelo, kiom malesper—is kaj sufer—is min via morto!

Gis nun la Akademio de Esperanto oficialigis 6 vortlistojn aldane al la Universala (Fundamenta) Vortaro. La lasta aldono ampleksas nur malmultajn vortojn, nome:

Angoro, Aperturo, Aplombo, Arbusto, Aŭguro, Aŭreolo, Bankiero, Gramofono, Grego, Honorario, Ingredienco, Koncesii, Konduktoro, Strebi, Susuri, Ŝrumpi, Visekcio, Vizio.

KOMUNIKOJ DE LA LIBRO-SERVOJ.

SANKTA NIKOLAO, LA TAGO DE LA SURPRIZOJ ALPROKSIMIĜAS! JAM NUN ELEKTU:

	Gld.	Belg. Fr.
Esperanta Krestomatio, dua eldono (ankaŭ por ekzameno A)	1,95	24,—
Miru-Pensu-Ridu, de P. Bennemann	5,40	72,—
Kredu min, sinjorino!, de C. Rossetti	5,40	72,—
La mondo ne havas atendejon, de M. Dekker	2,50	30,—
La Kapitanfilino, de A. S. Puŝkin	1,20	21,—
La verda koro, de J. Baghy	1,50	25,—
La mistero de l' sango, de Battaglia	2,10	25,—
Negulino kaj aliaj fabeloj, de Grimm	1,25	24,—
Vagabondo kaj Sinjorino, de Kloepffer	3,—	40,—
Pensoj de d-ro Zamenhof	1,10	12,—
Gösta Berling, de S. Lagerlöf	4,80	66,—
Brulanta sekreto, de S. Zweig	2,35	28,—
Princino de Marso, de E.R. Burroughs	1,—	16,—
Kiso de la reĝino, de I. F. Naŝivin	2,35	28,—
Hamleto, de W. Shakespeare, trad. L. Zamenhof	1,50	20,—
Marta, de E. Orzesko, trad. L. Zamenhof (uzita, sed bonaspekta)	2,—	
Rembrandt, la magiisto, de M. Muller, bind. (kun 100 ilustraĵoj)	5,—	65,—
Pordoŝildo kun stelo kaj „Esperanto parolata“	0,75	12,—
Argenta kulero kun stelo kaj bildo de Zamenhof (sen afrankokostoj)	7,50	
Lernolibroj:		
Fundamento de Esperanto, de L. Zamenhof	0,75	10,—
Esperanto in 20 lessen, de H. Bakker	2,75	36,—
Esperanto leren lezen, de G. F. Makkink	1,—	
Beknopt leerboek Esperanto, de G. H. Benink	1,65	22,—
Leerboek Esperanto, de G. H. Benink	2,10	30,—
Post la kurso, de G. P. de Bruin kaj F. Faulhaber	2,—	
Esperanto leerboekje I, de H. A. Appel	1,50	20,—
Tra la labirinto, de F. Faulhaber	5,90	85,—
Leerboek Esperanto, de F. Randi		30,—
Nia Lernolibro, de J. Lem, sepa eldono	2,50	
Zakwoordenboekje, de H. W. Alings	0,50	
Schidlof's woordenboek Esp. Ned. en Ned. Esp.	2,75	45,—
Plena Vortaro	11,50	175,—

MENDU ĈE

Boekendienst L.E.E.N., Z.O.-singel 5, Bergen op Zoom, (giro 76915) Vlaams Esperanto-Instituut, Blankenberge steenweg 72, Brugge (p.c.r. 3268.51)

Servisto, kiu estis ricevinta konsiderindan (gravan) salajropialtiĝon, festis ĉi tiun maloftan okazintaĵon, trinkante sennombrajn fojojn je la sano de sia ĉefo (estro). Fine veninte hejme(n) kaj falete suprenirinte la ŝtuparon, li volis refreŝigi sin. La lavotablo (tualeta tablo) staris tuj apud la malfermita fenestro. Per nefirma mano (tremantamane) li versis akvon en la lavopelvon, sed li ne povis eviti (malhelpi) ke subita brakturigo fluigis abundan sprucaĵon tra la malfermita fenestro, precize sur la kapon de preteriranta (pasanta) noktgardisto. „Ĉu vi povas iom atenti?“, ĉi tiu kriegis supren, je kio nia amiko kriis responde: „kion vi do faras en mia lavopelvo!“

Korektu la erarojn:

1. Ilian ferion laŭkitime ili pasis en la urbo Parizo kaj nur hieraŭ ili returnis. 2. Karese li glitigis la manon super la hararon de sia filino. 3. Vi nur kompleksas al mi, kiam vi bezonas mian helpon. 4. Sidante antaŭ mia skribotablo, la paperoj kuŝantaj antaŭ mi rememorigis al mi mian laboron. 5. Li priskribis ĉielon da superteraj guoj.

En Plena Vortaro tiuj vortoj estas presitaj ankoraŭ kun malgranda komenclitero. Vi do ŝanĝu tion kaj aldonu (inter Vinko kaj Vintro) Vinkto: fera najlo kun larĝa kapo por kunigi ferajn pecojn martele aŭ maŝine.

Vertaal:

UNU....

1. Je hebt dat cijfer bij vergissing in de kolom van de eenheden geplaatst. 2. Ieder afzonderlijk lid van de vereniging heeft het recht zich met andere leden te verenigen tot een plaatselijke afdeling. 3. Eensgezind zullen zij met elkaar strijden voor de eenwording van het mensdom. 4. Zij verenigde in zich allerlei goede eigenschappen. 5. Eenstemmig werd het besluit om eens in het jaar een eendaagse excursie te organiseren, goedgekeurd. 6. De laatsten zullen de eersten zijn. 7. Alle huizen waren verlicht; alleen het ene huis tegenover de kerk bleef donker. 8. Hij doet alles op z'n eentje. 9. Hij heeft het eerst de nationale eenheid verbroken. 10. De Verenigde Staten van Noord-Amerika hebben ongeveer 125.000.000 inwoners. 11. Als eersteling van zijn

VERDLANDO VOKAS

Listo de radio-disaŭdigoj en aŭ pri Esperanto kaj informoj. Tempindiko laŭ MET (= mezeŭropa tempo) valida ankaŭ en Nederlando kaj Flandrujo.

Mallongigoj: I = informoj. P = parolad(et)o. K = kurso. M = muziko.

Dimanĉe:

19.00-19.15 Sofio, 39,11 m: I.

Lunde:

8.15—8.30 Stokholmo, 19,80 m, 49,46 m: I
8.45—9.00 Lille, 235 m: K.I.
15.30—16.— Rio de Janeiro, 30,71 m, 375 m: K.
16.15—16.30 Stokholmo, 19,80 m, 27,83 m: I
23.15—23.20 Hilversum II, 298 m, VARA: I. (Nur ĉiudusemajne).

Marde:

2.15—2.30 Stokholmo, 19,80 m, 27,83 m: I
12.55—13.00 Berno, 16,87 m, 31,04 m, 48,66 m: P. de d-ro Arthur Baur
18.35—18.40 Berno, 19,60 m, 31,04 m, 48,66 m: Ripeto de la tagmeza dissendo.
23.15—23.30 Gvatemalo, 49 m: I.

Merkrede:

18.30—18.50 Romo, 25,40 m, 31,35 m: P
22.35—22.40 Vieno, 25,46 m, 513 m: I.

Ĵaŭde:

9.30—9.45 Parizo, 445 m: K.
12.55—13.00 Berno, 16,87 m, 31,04 m, 48,66 m: P. de d-ro E. Privat.
18.10—18.25 Vieno, 30 m, 203 m, 25 m, 41 m: P. (ĉiun duan jaŭdon).
18.35—18.40 Berno, 19,60 m, 31,04 m, 48,66 m: Ripeto de la tagmeza dissendo.

Vendrede:

18.30—18.50 Romo, 25,40 m, 31,35 m.
23.15—23.30 Hilversumo I, NCRV, 402 m: I. (nur ĉiun unuan vendredon en la monato).

Sabate:

21.00—21.15 Sofio, 39,11 m: I.
23.15—23.20 Hilversumo I, KRO, 402 m: I

Informojn pri Esperanto-radio-elsendoj sendu ne nur la radio-stacioj, sed ankaŭ la radio-aŭskultantoj al: S. S. de Jong Dzn, Radio-Servo N.C.K.E., Waltaweg 3, Tjerkwerd (Fr.), Nederlando.

TWEE MENINGEN OVER ESPERANTO

Het werk van dr Zamenhof is van internationale betekenis en kan een bijdrage leveren voor de wereldvrede. Een klein volk als het onze; dat van zijn bevolking de beschikking eist over vier verschillende talen: Nederlands, Frans, Engels en Duits, is bijzonder gebaat bij deze oplossing. Voor ieder normaal kind is het mogelijk naast de moedertaal een wereldtaal te leren. Een dergelijk onderwijs verdient ook het eigen taalgebruik. Men kan er mee aanvangen zodra het geheugen om oefening vraagt, dus reeds omstreeks het negende levensjaar. Men zou gerust vanaf het vierde leerjaar hiermee kunnen beginnen. En de kinderen zouden er plezier in hebben. Zal eindelijk deze gelegenheid geboden worden? De tijd is er rijp voor. En ook de eigen taal zal er bij winnen, wanneer een ieder leert, hiernaast ook een vergelijkende taal te spreken en te schrijven. Het is nu de tijd, Esperanto in te voeren. Ons volk zal er geestelijk rijker door worden en beter bekwaam om met „vreemden“ om te gaan.

J. A. SELLENRAAD, Insp. L.O., Enschede.

Hoewel Esperanto door enkele taalcomplicaties stellig niet volmaakt is, heeft het geen zin langer te zoeken naar een instrument, dat nog mooier en fraaier is, daar een bruikbare kunsttaal aanwezig is, die bovendien ingang heeft gevonden in praktisch alle landen van de wereld. Esperanto is goed gebleken als spreektaal en als schrijftaal en veranderingen aanbrengen in een kunsttaal die al wordt gebruikt, betekent het einde of minstens een schisma, dat ons veel verder van ons ideaal zou afbrengen, dan ooit tevoren het geval was. De enkele mogelijkheden tot verbetering moeten worden verworpen vanwege het aanzienlijke voordeel, dat de verbreiding van het Esperanto reeds zo groot is en nog dagelijks groter wordt, terwijl wetenschappelijke kringen in toenemende mate interesse tonen, hetgeen niet te verwonderen is, omdat de behoefte aan een eenheidstaal juist daar sterk wordt gevoeld.

Dr. C. P. S. van Oosten.

kudde offerde hij een lam. 12. Van haar vele kinderen waren sommigen goed en anderen slecht.

Uitwerkingen van Vlaamse cursisten voor 20 Nov. aan V.E.B., Studanto, postbus 342, Brussel, van Nederlandse cursisten aan A. J. Kalma, Stadionkade 6, Amsterdam-Z.

NED. ESPERANTISTEN-VEREN. „LA ESTONTO ESTAS NIA”

Alg. Secretariaat, schr. cursus voor beginners en uitleendienst:
Mr A. J. Kalma, Stadionkade 6, Amsterdam-Zuid, tel. 96160.
Penningm.: P. M. Mabesoone, Pythagorasstr. 122, Amsterdam-O, postrek. 34563.
Boekendienst, schr. cursus voor gevorderden en dipl. B: H Appel, Z.O.-singel 5, Bergen op Zoom, postrek. 76915.
Bibliotheek: E. A. Koot, Joh. de Meesterstraat 12, Utrecht.
Propaganda-dienst: H. Bakker, Van Tuylplein 33/1, Amsterdam-Zuid, tel. 95320.
Alg. Ned. Esp. Examen-comm.: Mej. H. M. Mulder, Zilvermewstr. 29, Badhoevedorp
Cefdel. U.E.A.: P. Moen, Schaarsbergenstraat 104, Den Haag, postrek. 79167.

KOMUNIKOJ
DE LA ĈEFESTRARO

La ĝen. sekr. atentigas la sekciajn estrarojn pri par. 33 de nia ĝen. regularo, laŭ kiu proponoj por la jarkunveno 1952 atingu la ĝen. sekr. antaŭ la 15-a de novembro 1951 kaj pri par. 68 kaj 70 laŭ kiuj la sekcioj rajtas proponi kandidatojn por la ekzamena komitato aŭ por la funkcio de ekzamenanto antaŭ la 15-a de novembro. Al la kandidatigoj estu aldona konfidenca rekomendo kaj klarigo de la koncernato, ke li pretas akcepti eventualan enoficigon.

La kursgvidantojn ni atentigas pri la eblo aboni 6 sinsekvajn numerojn de „Nederlanda Esperantisto” por siaj kursanoj. La abonprezo estas g. 0.60. Mendojn oni faru al la adm. de „Nederlanda Esperantisto”, kiu sendas la menditajn ekzemplerojn al la kursgvidanto por ke ĉi tiu distribu la gazetojn inter la kursanoj.

PLAATSELIJK NIEUWS

Alkmaar: De afdeling Alkmaar vergadert elke Donderdagavond 7-9 uur in een lokaal van de B.L.O.-school, Victoriapark (club- en lesavond). Belangstellenden van harte welkom! Secresse mevr. E. Dijkema-de Groot, Wollebrandtstraat 4, Alkmaar.

Deventer: Okazis propagandkunveno merkredon 10/10 en „Instituto por Popolklerigo” en Deventer. S-ro C. B. Zondervan, ĉefestraro de L.E.E.N. faris propagandparoladon. Post la parolado pluraj ĉeestantoj anoncis sin por kurso, kiun gvidos s-ino Houwink.

Groningen: 8/11 S-ro P. Nieboer rakontos pri sia interesa laboro; 15/11 F-ino A. Scholten rakontos pri sia libertempo; 22/11 F-inoj J. le Rutte, M. Meywes kaj A. Tebbenhof raportos pri la Universala Kongreso en München; 29/11 S-ro W. P. Selis rakontos pri sia vizito al „Artis” en Amsterdam; 6/12 Sankta Nikolao venos kun surprizo.

Leeuwarden: En la antaŭa numero ni jam provizore sciigis, ke sekcio Leeuwarden festos sian 25-jaran ekziston per regiona festkunveno dimanĉon 18/11 1951. Jen la programo: 10 h. Akcepto en „De Groene Weide”; 11 h. Malfermo, salutoj, muziko; 12 h. Festparolado de s-ro P. Hendriks; muziko; 13 h. Komunala tagmanĝo; poste promenado tra la urbo por bone funkcigi la digestorganojn; 15 h. Festprogramo. (Prezentado de poŝformata revuo „Per raketo al la luno” kaj kabaredprogramo. Kunlaboros aktoroj de Frisa Esperantista Rondo kaj junulargrupo Ekstazo). Sekcio Leeuwarden atendas multajn esperantistojn el la nordaj provincoj. Kotizo g. 1.20; tagmanĝo g. 3.-. Aligiloj haveblas ĉe s-ro D. Visser, Paardestraat 12, Leeuwarden, poŝtgirkonto 327827. Bonvolu anonci vin kiel eble plej baldaŭ!

Rotterdam: Fondiĝis 1-10-51 loka kunlabor-komitato en kiu kunlaboras la lokaj sekcioj de F.L.E., L.E.E.N., K.U.N.E. kaj NoSoBE, kiu bonege startis, aranĝante 13-10-51 prelegon de s-anino Rangakajo Chailan Sjamsoe Datoe Toemenggoeg el Indonezio, kiun ĉeestis pli ol 100 gesamideanoj. La loka gazetaro favore raportis.

V.E.B. Afdeling Brussel. Vanaf 11 Oktober beskikten wij over onze gebruikelijke zaal en hernamen ook de lessen. Volgende bestuursleden werden verkozen: voorzitter, dhr. De Bruyne; secretaresse, mej. Impanis M.R.; penningmeester, dhr. Monnaers. Programma November werd als volgt vastgesteld: 9/11 vertaling uit het Esperanto; 15/11 vertaling uit het Nederlands; 22/11 Muziekavond; 29/11 Tribunal Vespero. De lessen en vergaderingen vinden plaats in Hotel „Monico”, Brabantstr. 2; aanvang 8 uur.

V.E.B. Afdeling Gent. Ons lid Roger de Schepper slaagde in zijn examen aan de universiteit en gaat dus het laatste jaar in voor het behalen van de ingenieurstitel.

Van 14 tot en met 21 Oktober werd een tentoonstelling van Esperantoboeken ingericht in de Stadsbibliotheek. Wij hopen dat deze veel vruchten zal afwerpen voor de cursus welke op 23 Oktober aanvangt in het lokaal van V.T.B. Gent, ingang Paddenhoek. De esperantisten van Gent en omliggende

La adm. ĉefestraro de L.E.E.N. proponas malgraŭ la altigitaj elspezoj por papero, presajoj, k.t.p. ne plialtigi la kotizojn por la jaro 1952.

L.E.E.N. intencas organizi gazetarservon laŭ la principoj indikitaj en la ĉefartikolo de ĉi tiu numero. Ĝi invitas ĉiujn, kiuj povas kaj pretas helpi, anonci sin. Ankaŭ madestuloj sendu sciigon. Ni bezonas ne nur personojn de grandaj kapabloj, sed ankaŭ multajn, kies tasko estas nur plenumi la indikojn de la gvidanto. Kiu estas preta preni sur sin la taskon de gvidanto? En la sekcioj oni diskutu la problemon kaj sciigu al ni kiujn proponojn oni povas fari.

Devkonscia L.E.E.N.-anaro,
Senhezite al posteno!
Ŝparu en la nuna jaro
Por kongres' en Antverpeno!

plaatsen, worden hiermede vriendelijk uitgenodigd regelmatig de vergaderingen bij te wonen welke elke Woensdagavond om 8 uur plaats hebben in Café de Gand, Graaf v. Vlaanderenstr. 10, Gent.

V.E.B. Afdeling Mechelen. Een nieuw bestuur werd verkozen: voorzitter w.n. dr. Th. van Gindertaelen; secretaris, dhr. van Humbeek; penningmeester dhr. P. Schoeter. Onze cursus ving aan in de Jongensschool, Louisastraat, op 16/10: 12 leerlingen hebben zich aangemeld; de lessen gaan regelmatig door iedere Dinsdag en Donderdag van 7 tot 8.30 u. Het programma November is als volgt: 7/11 enigmoj; 14/11 gramatiko; 17/11 Esperantofeestje, zoals hieronder aangekondigd; 21/11 lezing door mej. S. Nellissen; 28/11 spreekoefeningen. Dit jaar gaat ons feestje door op Zaterdag 17 November in „De Drie Peerdekens”, Begijnenstraat (Onder den Toren). Er zal een gezellig gemeenschappelijk avondmaal doorgaan te 19.15 u. waaraan iedereen mag deelnemen mits na tijdige aanmelding en betaling van 100 frs., drinkgeld inbegrepen, doch zonder drank voor volgend menu: Voorgerecht, potage, 1/2 kiesen met sla of compote en aardappelen, nagerecht. Daarna rond 8.30 u. vangt een gemengde avond aan tijdens dewelke zang, voordragen, mopentappen en dergelijke meer met bal, tot in de kleine uurtjes. Alle leden en vrienden van V.E.B. zijn hartelijk uitgenodigd. Zich voor het avondmaal aanmelden bij onze penningmeester dhr. P. Schoeter, Stenemolenstraat 111 te Mechelen. Er kan gezorgd worden voor slaapgelegenheden voor zeer voordelige prijs.

BIBLIOGRAFIO

Bulteno de Informservo de Internacia Grupo Esperantista de Morala Rearmado (en Köge, Danl.); stencilita informilo en kiu tiom abundas preseraroj kaj gramatikaj stultajoj, ke ĝi fakte ne valoras menciion malgraŭ la sendube bona intenco de la verkintoj.

Kolonjo apud Rejno, 4-paĝa faldfolio, senpage havebla ĉe Verkehrsamt, Domkloster 3, Köln.

Nia Lernolibro, de Jac. Lem; 7-a eldono, eld. F.L.E.; prezo g. 2.50. Recenzota.

Lingvo kaj Movado (Wat de A-candidaat van de geschiedenis van Esperanto moet weten); 2-a reviziita eldono, eld. F.L.E.; prezo g. 0.55.

Prinsessenkalender 1952, eld. de Ned. Verbond der Verenigingen „Pro Juventute”. Plaĉaspekta grandformata kalendaro kun monataj folioj kun entute 13 klaraj kaj ĉarmaj fotoj (20 x 22 cm) pri la nederlandaj reĝinidinoj, speciale disponigitaj por tiu celo de sia reĝina Moŝto. Se oni volas subteni la simpatian laboron de „Pro Juventute”, kiu okupas sin pri protekto kaj helpo al minacataj infanoj, oni aĉetu la kalendaron, pagante g. 2.75 en poŝtkonton 517400 (aŭ poŝtmandate) de Kalenderactie „Pro Juventute”, W. de Zwijgerlaan 26 B, Den Haag.

Antaŭ du mil jaroj, romano de F.C. Xavier, el la portugala trad. L.C. Porto Carreiro Neto. Eld. Brazila Spiritisma Federacio, Rio de Janeiro, 1951; 399 p.

Flandra Ligo Esperantista.

Postbus 342, Brussel.

Sekretario: G. Maertens, Prins Leopoldstraat 51, Sint-Kruis.
U.E.A. peranto: Dr. F. Couwenberg, Koninginnelaan 14, Blankenberge P.C. 4161.85.
Redakcio F.E.: Dr. T. van Gindertaelen, Louisastr. 23, Mechelen.

Open Brief aan alle
VLAAMSE ESPERANTISTEN

November 1951.

Beste Vrienden,

Verspreid over ons ganse Vlaamse Land zijt gij de dragers en verdedigers van ons gemeenschappelijk ideaal: de invoering van Esperanto als wereldhulptaal.

Ieder van U draagt in meerdere of mindere mate tot de verspreiding van dit ideaal bij. Schitterende resultaten werden verkregen door onvermoeibare propagandisten. Belangeloos offeren vele stille werkers hun vrije tijd om kursussen te geven, of op andere wijzen onze zaak te bevorderen. Desondanks stelden wij een verminderende belangstelling vast. Dat alle Vlaamse kulturele bewegingen hetzelfde verschijnsel vaststellen laat ons toe te besluiten, dat het hier niet gaat om een strekking tegen Esperanto zelf.

Wat echter ook de reden(en) van dit verschijnsel weze(n), het komt er voor ons op aan het tijt te doen keren en opnieuw meer schot in onze beweging te krijgen. Het beste middel tot een doeltreffende actie is wel de samenbundeling van alle beschikbare krachten.

Gij, Vlaamse Esperantist, moogt niet langer alleen blijven staan; uw plaats is in de Vlaamse Esperantisten Bond. En gij, die reeds lid zijt van onze bond, weet dat onze actie hoofdzakelijk gevoerd wordt op het lokaal plan: uw plaats is dus in de plaatselijke afdeling van onze bond.

INTERSAŜO KAJ KUNLABORO

En multaj sekcioj ĉiam la samaj personoj faras la laboron; ili gvidas la kunvenojn kaj faras prelegojn, sed kiom ajn spertaj ili estas, fine por la grupanoj estas iom tede, ĉiŭfoje rigardi la saman vizagon kaj aŭskulti la saman voĉon. Komprenoble la klubanoj volonte akceptas eksterlandan gaston en sia mezo, sed nur malofte estas eble, inviti eksterlandanon. Oni do foje invitu kompetentan samideanon el najbara sekcio aŭ el sekcio de alitendenca Esperanto-asocio por fari prelegon aŭ por prizorgi la programon kaj rekompence oni pruntedonu spertulon al la propra rondo al najbara sekcio. Kvankam ĝis nun nur du personoj(!) reagis al la artikolo „Prelegantoj atentiu!” en la antaŭa numero, ni estas certaj pri tio, ke la nombro de esperantistoj, pretaj kaj kapablaj fari prelegojn, k.t.p. estas multe pli granda.

Ofte diversaj aranĝoj estas fareblaj nur, se la nombro de la ĉeestantoj estas sufiĉe granda. La plej bona solvo estas kontakti kun aliaj grupoj, ĉar kontakto kun personoj el aliaj sekcioj kreas novajn amikajn rilatojn kaj la okazon intersanĝi ideojn kaj sugestojn pri propagando aŭ pri la aranĝo de grupvesperoj.

Pluraj sekcioj (i.a. Haarlem, Rotterdam, Amsterdam) regule dissendas al siaj anoj stencilitajn monatajn bultenojn kun la programo por la venonta monato kaj diversaj sekciaj novaĵoj, sed ofte unu sekcio tute ne estas informita pri la vivo en la alia grupo kaj pro tio ni laŭ peto de sekcio Amsterdam proponas, ke la sekciaj estraroj bonvolu sendi regule la bultenon ankaŭ al la sekretario de la aliaj sekcioj, kiuj intersanĝe sendu la sian. La ĝen. sekretario petas la sekciajn estrarojn, kiuj pretas fari tion, sciigi tion al li. Ricevinte la necesajn informojn li sendos al la koncernaj sekretarioj liston kun la adresoj de la sekciaj sekretarioj, kiuj ŝatas regule ricevi la bultenojn kaj pretas intersanĝe sendi la siajn.

Nederlanda Centra Komitato Esperantista jam foje turnis sin al la lokaj sekcioj de la kunlaborantaj asocioj kun la sugesto starigi lokajn kunlabor-komitatojn, kiuj en siaj loĝlokoj povas labori same kiel N.C.K.E. sur nacia tereno. Sed ne nur sur propaganda tereno tiaj lokaj komitatoj, jam ekzistantaj

Waar deze niet bestaat dient alles gedaan om tenminste toch een kern te vormen. De ondervinding heeft afdoende bewezen dat de alleenstaanden het gemakkelijkst de moed verliezen, en weldra voorgoed voor onze beweging verloren gaan.

Dit was, beste vrienden, in enkele woorden wat mij bij het ingaan van het nieuwe werkjaar van het hart moest.

Voor uwe belangstelling dankt u hartelijk,

Fl. Esp.



Voor het jaar 1952 werden de lidgelden op hetzelfde peil gehandhaafd, dit ondanks de gedurig stijgende kosten.

Mogen wij onze leden die hiertoe gelukkig in staat zijn vragen een steunabonnement te nemen, ten einde de zware last welke het uitgeven

van ons blad (waarop wij terecht fier mogen zijn) medebrenge, enigszins te verlichten?

De verschillende lidgelden bedragen: steunend lid 150 fr. minimum
gewoon lid 75
inwonend lid 25 met „De Esperantist”
onder 21 jaar 50

Belangstellenden kunnen toetreden als Vrienden van de V.E.B., tegen een lidgeld van 20 fr. Zij ontvangen „De Esperantist”.

De bijdragen mogen onmiddellijk gestort worden.

Men betale bij voorkeur door bemiddeling van de locale afdeling of de vertegenwoordiger, en zo dit niet mogelijk is, op het postchecknummer, vermeld in de hoofding van het blad.

De penningmeester.

NENIU BONA AG'

Laŭ Jo Spierenburg.

Neniu bona ag'
Jetita en la vivon tagon post tag',
El fonto de l'ameco
Estos perdita en rikolt' de l'eterneco

Jen fruktodona sem'
De l'am', semita kaŝe, kun la em'
Al granda abundeco!
Rikolton riĉan donos ĝi en estonteco!

M. E. Nawijn.

Virino ĉiam scias pli ol viro opinias.

Avido prenas, amo komprenas.

Oni ne timu iam ebrii. La tero estas tiom ronda, ke oni neniel povas fali de ĝi.

La popolo parolas lingvon, ofte pli bonan ol verkas la poetoj kaj certe pli kernan ol la instruistoj. Kia miraklo! La fonto de la lingvo ja estas la popolo kaj ne la vortaro.

Copy voor het volgend nummer inzenden vóór 14 November s.v.p.

